

110 jaroj de Esperanto en Brno

1901 - 2011



La lastaj dek jaroj 2001-2011
aldono al la broŝuro
Cent jaroj de Esperanto en Brno 1901-2001

Esperantista Klubo en Brno
2011-05-21

Solena kunveno
okaze de la 110-jara jubileo de organizita
Esperantista movado en Brno

sabate la 21-an de majo 2011
en Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

10.00 - 10.10	Bonvenigo
10.10 - 10.30	Muzika matineo de Miroslav Smyčka
10.30 - 11.00	La naskiĝo kaj kresko de organizita Esperanto-movado en Brno (M. Malovec)
11.00 - 11.10	Paŭzo
11.10 - 11.30	Alparolo de la honora prezidanto Z. Hršel
11.30 - 12.00	Esperantista junularo de Brno (M. Hruška)
12.00 - 13.00	Diskutado, rememorado
13.00 - 14.00	Tagmanĝa paŭzo
14.00 - 14.30	Klubaj prezidantoj kaj aliaj gravuloj en la historio de la klubo (M. Malovec)
14.40 - 15.10	Klubaj kulturaj programoj (V. Podhradská)
15.20 - 15.50	Esperanto en perspektivo (P. Lehký)
16.00 - 16.30	Kvar plus unu klubaj epizodoj fiksitaj en mia memoro (J. Werner)
16.30 - 17.00	Diskutado kaj fermo

La solenon akompanos ekspozicieto pri la 110-jara agado de la esperantistaro en Brno kaj libroservo.

Kroniko de Esperanto en Brno en la jaroj 2001-2011

(aldono al la broŝuro *Cent jaroj de Esperanto en Brno 1901-2001*)

2001: La klubo festis sian 100-jariĝon sabate la 26-an de majo en la Malnova Urbodomo, en saloneto pruntita de la urbestro Petr Duchoň, kies reprezentanto Pavel Kuba salutis la kunvenon (ĉ. 100 personoj). La ĉefan paroladon prezentis la kluba prezidanto Zdeněk Hršel, la kulturan programon prizorgis s-ino Helena Supová-Halířová kun sia junulara kantista ensemblo kaj Miroslav Smyčka. La kunvenon gvidis Marie Klimentová, interpretis Pavel Polnický. La klubo eldonis bildkarton kaj broŝuron *Cent jaroj de Esperanto en Brno*. En la antaŭĉambro funkciis libroservo kaj ekspozicio pri la klubo aranĝita de O. A. Fischer. Dum OSIEK-konferenco en Strážnice dediĉita al K. Píĉ, M. Malovec redaktis la konferencan bultenon. Josef Vojáček instruas Esperanton en Masaryk-universitato kaj kun Miroslav Malovec kaj Josef Hron (Pardubice) gvidas asocian sekcion de informadiko. J. Werner akiris premion Luigi Minnaja de Belartaj Konkursoj pro eseo *Kulturo de komunikado* (UK Zagrebo).

2002: Fondita *Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno*. Dum la asocia kongreso en Prago du niaj membroj estis distingitaj per honora membreco de ĈEA (Věra Podhradská kaj Zdeněk Hršel). V. Podhradská konfirmata kiel asocia prezidantino. Kvar membroj partoprenis KAEST en Praha, nome Věra Podhradská (organizado), Miroslav Malovec (*Esperanto en la virtuala mondo*), Josef Vojáček (*Logika programado kaj duonaŭtomata tekstotradukado*) kaj Jan Werner (*Ĉesigi la disipadon de fakula energio en la movado*). Miroslav Malovec komencis kontribui al la esperantlingva reta enciklopedio Vikipedio kaj kun helpo de Chuck Smith fondis la **ĉeĥan version**. La Societo preparis materialon *Posuzujme esperanto objektivně* (Ni prijuĝu Esperanton objektive). Jan Werner prilaboris **Terminaron de betono kaj betonistaj laboroj**. Forpasis d-ro Evžen Wohlgemuth, zoologo. M. Malovec enkomputiligis tradukojn de J. Vondroušek (Hordubal, Meteoro, Ordinara vivo, Poŝrakontoj, Historio kaj biografioj) kaj preparis por presado kvar publikaĵojn (Bergrová, Karen, Váňa, Ludíková).

2003: Aprile niaj membroj kontribuis al Esperanto-programo ĉe la ekspozicio **Libromondo 2003** en Prago (prizorgis poetino Věra Ludíková) kaj ĉe ekspozicio de fremdlingvaj tradukoj el Karel Čapek en Strž. Dum OSIEK-konferenco en Prago denove M. Malovec redaktis la konferencan bultenon. M. Malovec metis en Vikipedion artikolojn de *Enciklopedio de Esperanto (1935)*, kiujn aliaj vikipediistoj aktualigas. Forpasis Alena Růžičková-Pavlinová, honora membrino de ĈEA. J. Vojáček kaj M. Malovec estis invitetaj al Frankfurt ĉe Majno instrui Esperanton al lokaj esperantistoj.

2004: La klubo festis 100-jariĝon de du grandaj klubanoj, nome **Josef Vondroušek** kaj **Vilibald Scheiber**. Venis reprezentantoj de la partnera urbo Stuttgart. Jan Werner aperigis ĉe KAVA-PECH libron **Terminologiaj konsideroj** kaj Jaroslav Pokorný preparis ekspozicion en agrikultura muzeo en Valtice. M. Malovec enkomputiligis la tutan verkaron de František Omelka. En KAEST partoprenis J. Werner (*Planlingvo*) kaj M. Malovec (*Vikipedio - Aktualigo de Enciklopedio de Esperanto 1935*). Ekfunkciis Enciklopedio de la urbo Brno, por kiu M. Malovec prilaboris plurajn temojn (Vondroušek, Kořínek, Šikula, Fondo de la Unua societo 1901, fondo de ĈEA 1969, Verda Stacio).

2005: Eldonita prelegaro Verda Duopo pri Vondroušek-Scheiber. La klubon vizitis klubanoj el la partnera urbo Rennes kaj nia reprezentanto Marek Blahuš vizitis partneran urbon Stuttgart okaze de la 100-jariĝo de la loka Esperanto-klubo. Inĝ. Josef Vojáček gvidas Esperanto-kurson ĉe Masaryk-universitato. En la klubo aktivis tri junuloj (Marek Blahuš, Pavel Hrdlička, Miroslav Hruška). Inĝ. Jan Werner redaktis broŝuron **Jarkolekto de TAKE**

2005 kaj eldonas kajerojn Konstru-forumo; Marek Blahuš fondis tutŝtatan **Ĉeĥan Esperanto-Junularon**. Forpasis Marta Lorková, multjara kluba kasistino, kiu ofte preparis kulturajn programojn. M. Malovec esperantigis poemon por *Taglibro de mia frato* pri Petr Ginz (la libron mem esperantigis Věra kaj Vlastimil Novobilský). M. Malovec kontribuis por la reta Biologia Libraro (BioLib) per esperantlingvaj nomoj de plantoj kaj animaloj laŭ PIV, poste helpis L. Středa el Úpice kaj J. Hron el Pardubice. J. Werner esperantigis la unuan rakonton el la libro de Milan Kundera *Můj Janáček* (Mia Janáček) kaj pere de la eldonejo Atlantis petis la aŭtoron pri permeso, sed ne ricevinte ĝin, aliajn rakontojn li ne tradukis.

2006: Elektetblan studobjekton „esperanto“ elektis 80 studentoj de Masaryk-universitato, el kiuj 50 finis ĝin. **Junaj esperantistoj** en Brno fondis propran klubon. Novembre efektiviĝis seminario „**Lingvoj en interreto**“ por 23 gejunuloj el 23 landoj (eĉ el Brazilo kaj Kanado) kun financa kontribuo de EU el fondaĵo por junularo. Inĝ. Jan Werner iniciatis **Esperantologian kaj Literaturan Forumon (ELFO)**, kiun li gvidis per siaj leteroj. Niaj gejunuloj aktive partoprenis eldonon de DVD **Esperanto elektronike**, verkon de societo **E@I**, kie ili aktivis. En KAEST Dobřichovice partoprenis M. Blahuš (*Unikodo - Esperanto de Interreto*), J. Werner (*Ĉarpentistaj lignoligoj*) kaj M. Malovec (*Maŝinelementoj laŭ Ján Mužlay*). M. Blahuš interpretis en Bratislava por Višegrada kvaroj kaj reprezentis TEJO-n en junulara renkonto en Hispanio. Kun M. Hruška li vizitis Silvestron en Nowy Sącz.

2007: Studentoj de Masaryk-universitato (49 geknaboj) plenumis studkontrolon, pluaj 9 en Olomouc; Mgr. Zdeněk Hršel esperantigis prospekton **Brno - ĝusta direkto**, troveblan en la magistrata retejo. Inĝ. Werner kolektis siajn **Leterojn ELFO 2006-2007**. En viena kolokvo Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj partoprenis M. Malovec (*Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de libroj per elektronikigo*) kaj M. Blahuš (*Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj cifereca arkivo de Esperanto-literaturo*). M. Blahuš partoprenis prelege interlingvistikan seminarion en Berlino germanlingve. Niaj junuloj vojaĝis tra Ukrainio kaj partoprenis en ago-semajno de la pola Malbork.

2008: Nova societo **E-lingvo**, fondita de D-ro Pavel Lehký, eldonis surpapere la supre menciitan prospekton pri Brno kaj sian propran varbilon. M. Malovec helpis prepari **Esperanto-muzeon** en Svitavy kaj ĝian prospekton, same esperantigon de retejo de Svitavy. Adolf Veselý donacis al la muzeo reliefan portreton de Eŭgeno Lanti, kiun li konservis hejme dum jardekoj. Jan Werner verkis broŝuron **Koteado en konstru-desegnoj**. J. Werner, V. Podhradská kaj M. Malovec kolektas informojn pri esperantistoj enkadre de projekto **Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado**. En la klubo filmis **Ĉeĥa Televido** kun nia junularo. Jan Werner aperis en dokumenta filmo de Ĉeĥa Televido **Interhelpo - historio de unu iluzio**. Forpasis Magistrino Milena Picková. V. Podhradská preparis la asocian kongreson en Přerov kaj finis sian laboron en la asocia komitato, elektita estis M. Malovec. En KAEST Dobřichovice partoprenis aktive J. Werner (prelego *Kvar jaroj de Konstru-Forumo*), J. Vojáček (*Esperanto, scienco kaj tekniko - kelkaj konsideroj al estonteco*) kaj M. Malovec (*Pri konstruado de elektronika biblioteko-arkivo*). La lasta kontribuis per simila teksto por la festlibro de Tonkin. M. Blahuš sukcese prezentis sian bakalaŭran anglalingvan laboron *A Spell Checker for Esperanto* (Literumkontrolilo por Esperanto). M. Malovec esperantigis kinologian retejon Zooplanet. J. Werner publikigis en *La Ondo de Esperanto* 8-9/2008 rakonton de Jan Balabán *La pano de juna aĝo* kun permeso de la aŭtoro, kiu en 2010 neatendite mortis 49-jara.

2009: D-ro Lehký el E-lingvo partoprenis Ĉeĥan Konferencon en Poděbrady, kie li prelegis pri lingva problemoj en Eŭropo. Ĉi tiu unua prezento ne vekis grandan intereson. Slovaka eldonejo Espero eldonis libron **1111 anekdotoj en Esperanto** de **Josef Borský**, aŭtoro el Brno. M. Hruška akompanis duopon el Koreujo tra Brno kaj al Pardubice, poste grupon de

slovakaj esperantistoj al Macocha, J. Werner montris nian urbon al grupo de rusaj esperantistoj celantaj al UK. Bohumila Trzosová venigis esperantiston Emílio Morales Ortega el Hispanio, urbo Valencio. En salono de la biblioteko Mahen okazis poezia vespero de rusa poetino Ljubov Vondroušková, kies versojn esperantigas J. Krolupper. Esperanton prezentis al neesperantistoj J. Werner. J. Vojáček aperis en la televido Prima ne programo *Divenu, kiu mi estas*. M. Blahuš instruis en InPaSem (Dobřichovice), J. Werner en Skokovy. M. Malovec elektita kiel kluba prezidanto, V. Podhradská kiel prezidantino de la Societo. M. Malovec esperantigas retejon de A. Vyšínková pri marcipano.

2010: D-ro Lehký partoprenis Ĉeĥan Konferencon en Poděbrady la duan fojon kaj ĉifoje lia prelego **Kudy a jak dál** (*Tra kie kaj kiamaniere pluen*) estis konsiderata inter la dek plej interesaj (el kvindek), ĝi estas eĉ legebla (ĉeĥe) en la retejo de la konferenco inkluzive de fotoj (bildoj 67-72); inĝ. Jan Werner eldonigis sian tradukon de studenta romano **Fieraj koroj** de Eda Jitzovský kaj **Jarkolekton de TAKE 2010**; en la retejo estas atingeblaj liaj kajeroj **Konstru-Forumo**; Marek Blahuš esperantisgis libron de Max Kašparů **Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj** kaj Miroslav Malovec esperantisgis anekdotojn de Pavel Rak **Desegnita humuro** kaj poluris versojn de Elena Popova **Rim-enigmoj**. Věra Podhradská prizorgis ekonomion de ĉiuj tri etapoj de **SET Lančov** (cetere kiel ĉiujare dum lastaj jardekoj), Miroslav Hruška instruis laŭ metodo de Pavel Lehký. Miroslav Malovec enkomputiligis ĉirkaŭ 600 tekstojn de Jiří Kořínek, inkluzive de **Serĉado de blua tono** de Jiří Karen pri la vivo de Chopin. Kun Viktor Dvořák el Moravské Budějovice li preparas libron pri Otakar Březina (tradukoj de Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek) kaj kun Petr Chrdle novan eldonon de la dramo **R.U.R.** de Karel Čapek en traduko de Moraviaj Esperanto-Pioniroj (verŝajne Josef Řebíček). Marek Blahuš gvidis ĉeĥan karavanon al UK en Havano kaj reprezentis tie ĈEA kaj ĈEJ. Esperanton li prezentis en televido *Ondo el Brno*. M. Blahuš kaj M. Hruška aktive partoprenis la konferencon KAEST en Modra (Slovakio). La prelego de Blahuš (*Literumkontrolilo por Esperanto*) estis samtempe lia bakalaŭra disertacio e Masaryk-universitato. Kiel staĝanton de la teamo E@I la universitato sendis lin al Francio por aŭtuno 2010 kaj printempo 2011. F. Frýbert transloĝiĝis al Prago.

2011: Ĉe la asocia retejo M. Malovec fondis paĝon **Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado** kun 500 personoj kaj ilia konciza karakterizo. En la ĉeĥa vikipedia gazeto **Wikimedium** aperis intervjuo kun M. Malovec pri fondo de la ĉeĥa Wikipedia en 2002. J. Vojáček reprezentis Esperanton ĉe stando Zooparadizo dum hundo-ekspozicio en Brno. J. Werner verkis kaj eldonis *Ladistaj produktoj en konstruado*. Pavel Lehký gvidas sektion pri komunikado en *Česká konference 3*, nunjare en Kutná Hora.

Rememore pri gravuloj de la klubo

Marie Adamcová (1893-1983) en la 1950-aj jaroj gvidis klubajn teatrajn spektaklojn, kiujn ŝi lerte reĝisoris. En 1970 ŝi estis nomumita honora membrino de la klubo. En 1977 Jiří Kořínek dediĉis al ŝi sian poemon *Kvindek jaroj por Esperanto*.

František Baďura (1896-1959), kluba prezidanto 1931, estis polica inspektoro. Kiel kluba prezidanto li inaŭguris la 5-an Internacian Kongreson por Seksa Reformo en Brno (1932) kaj prelegis en Verda Stacio pri sporto. Post okupacio li laboris en subtera rezisto-movado kaj dufoje forkuris de Gestapo per aveturplenaj fuĝoj. Li rifuĝis al Palestino, kie li submetiĝis al soldata trejnado kaj dum forpermesoj vizitadis esperantistojn. El la milito li revenis kun malsana dekstra mano, tial li siajn rememorojn diktis al J. Vondroušek. Konservigis ankaŭ lia junula foto de UEA-delegito.

Arnošt Baláš (1919-1997) longe li gvidis Esperanto-rondeton ĉe la 1-a Maŝinfabroko de Brno, prilaboris historion de la rondeto (1990), eldonis historion de Brno *Brno invitas vin* kaj verkojn de Milda Jakubcová, ofte li prelegis en la klubo pri diversaj temoj.

Josef Barvíř (1879-1955) estis pionira esperantisto, kiu uzis pseŭdonomon Jan Blahoslav. Komence li vivis en Prago kaj laboris kiel protokolisto de *Esperantista klubo en Praha* kaj en 1908 sekretario de nova organizo *Bohema societo esperantista en Praha*. Post la unua mondmilito li transloĝiĝis al Brno, kie li esperantigis verkojn *Moravia Karsto* de Karel Absolon kaj *Ligado de Kaptukoj* de pentristo Joža Úprka. En 1923 li partoprenis kun Augustin Pitlík *Internacian Konferencon pri la Solvo de la Problemo de Internacia Lingvo por Komercio kaj Trafiko* en Venecio, kiu akceptis rezolucion favoran al Esperanto.

Josef Bednář (1887-1966), kluba prezidanto 1929, estis direktoro kaj posedanto de komerca lernejo, aŭtoro de lernolibro *Esperanto v 10 hodinách a 500 slovech* (Esperanto en 10 lecionoj kaj 500 vortoj, 1925). Verda Stacio elsendis kvar liajn kursojn en 1927, do antaŭ la komenco de la regulaj elsendoj (tiuj komenciĝis en 1932). Li ankaŭ rerakontis kaj libroforme eldonis aventurojn de Barono Münchhausen sub titolo *Barono Mensogbabilulo kaj liaj plej bonaj aventuroj* (Baron Prášil a jeho nejlepší dobrodružství, 1926).

Aleš Berka (1909-1983) estis esperantisto el Vsetín, tamen en Brno li fondis eldonejon de malkaraj libroj kaj kiel prezidanto de Klubo de Katolikaj Esperantistoj en Brno li aranĝis la 18-an Internacian Kongreson de Katolikaj Esperantistoj en Brno (1936). Lia eldonejo sukcesis eldoni nur kelkajn verkojn, el kiuj pleje gravas dramo *Fino de la mondo* de Jan Filip. Post la milito li revenis al Vsetín, eldonadis Informilon de Vsetín kaj sukcesis eldoni broŝurojn *Esperanto - lingvo internacia, Interesa legaĵo* kaj vortarojn en ambaŭ direktoj.

Tomáš Borkovec (1906-1987) honora membro de nia klubo (1970), en 1950 li laboris kiel kasisto de la tutŝtata esperantista kongreso en Brno, en 1961 ricevis diplomon pro la multjara laboro por la klubo, kiun li faris kun sia edzino Hedvika. Al la klubaj propramoj li kontribuis per prelegoj pri kinematografio, faŭno, Tero, Luzacio, kasteloj, matematikisto Lerch, vojaĝisto Paclt, antikvaj grekoj, kapitano Bontekoeo, satiroj de Jirotko, pensantaj maŝinoj, J. Swift, J. Š. Baar, tradukarto, O. Henry, horloĝoj, zoologia ĝardeno, A. Musil, oceanografio k.a., kiuj pruvas vastecon de liaj intereso.

Josef Cink (1933-2011) el Červená Voda studis en la 1950-aj jaroj en Brno kaj partoprenis la junularajn aranĝojn, ekzemple teatrajn spektaklojn. Li apartenis al la plej bonaj ĉeĥaj esperantistoj, kion li pruvis ne nur per siaj du famaj lernolibroj (*Korespondenční kurs esperanta, Cvičebnice esperanta pro pokročilé*) kaj kantaretoj (*Junulara kantareto 1, 2, 3*), sed ankaŭ per siaj tradukoj de kantoj. Lia lasta verko estis ĉeĥlingva broŝuro *Červená Voda a okolí blízké i vzdálené* (Červená Voda kaj ĉirkaŭaĵo proksima kaj malproksima).

Jakob Dietrich, kluba prezidanto 1905 - inspektoro de fervojo, post disfalo de la societo je bohema kaj germana partoj en 1905 li iĝis prezidanto de Germana Grupo Esperantista en Brünn. Nek pri li, nek pri la grupo ni havas pliajn informojn.

Oldřich Franzl (1897-1965) estis juristo veninta al Brno el Písek. En Brno li laboris kiel direktoro de la agrara banko. Esperanton li eklernis kiel pensiulo kaj tre diligente komencis verki kaj traduki sub pseŭdonomo G.P. (Gustav Písecký). Li postlasis tajpitajn manuskriptojn de frazeologiaj esprimoj, ĉeĥaj proverboj, antologio de roma prozo, Cezaro de Suetonio, tradukoj el Cicero, Horatius kaj Zeyer (ĉio legebla en nia kluba retejo).

Rudolf Fridrich (1878-1944), kluba prezidanto 1922 kaj 1925, studis en la Praga universitato ĉeĥan kaj francan lingvojn kaj iĝis gimnazia profesoro sinsekve en Třeboň, Prostějov kaj Brno-Královo Pole. Esperanton li lernis en 1898, en 1901 li havis en Prostějov unuan publikan prelegon, en 1906 kurson, en 1907 rondeton kaj en 1909 li atingis ĝian oficialan aprobon. En 1921 li transloĝiĝis al Brno, en 1926 li iĝis gimnazia direktoro. En 1938 li pensiigis, foriris al Pardubice kaj restis tie ĝis morto. Li verkis multajn artikolojn kaj tradukojn, el kiuj la plej fama estas *Benedek* de J. S. Machar pri aŭstria generalo. Li tradukis fragmentojn ankaŭ el K. Čapek, A. Jirásek, O. Březina, V. Dyk, J. Zeyer k.a.

Josef Friedrich (1890-1968) estis fervoja konsilisto en Košice, en 1911 li kunfondis la klubon en Olomouc, dum la unua mondmilito li estis militkaptito kune kun Julio Baghy en orienta Siberio. Post la milito li apartenis al Moraviaj Esperanto-Pioniroj, laboris en gvidaj arganoj de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj finon de sia vivo li travivis en Brno.

Václav Halíř (1926-1999) estis ĉeĥa operkantisto, basulo, amiko de Esperanto, kiu ofte kun sia edzino Helena Halířová-Supová koncertis por nia klubo kaj ankaŭ por nia UK en Prago 1996. Li estis solkantisto de operejo Janáček en Brno, kie li kantis en multaj roloj de Janáček, Martinů, Smetana, Dvořák, R. Strauss, Prokofjev, Ravel k.a. Lian karieron startigis venkoj en pluraj kantistaj konkursoj (Praga Printempo 1954 k.a.)

Jaromír Hoffner (1899-1976), kluba prezidanto 1934, estis kleriko kaj instruisto de Ĉeĥoslovaka Eklezio en Tuřany. Esperanton li lernis ĉe Antonie Janalíková en Kroměříž kiel dudekjarulo, dum la studado en Prago li vizitadis pragan esperantistan klubon, ekde 1930 li estis en Brno. Kiel kluba prezidanto li inaŭguris la 6-an Ĉeĥoslovakon Esperanto-kongreson en Brno 1935 en la nomo de LKK, en 1950 li salutis la 7-an kongreson en Brno en la nomo de la praga episkopo de Ĉeĥoslovaka Eklezio. En 1969 en la konstitucia kongreso en Brno estis fondita ankaŭ sekcio KELI kaj li tuj estis elektita ĝia honora membro. En la klubaj postmilitaj programoj plurfoje aperas lia nomo kiel de gvidanto de literaturaj vesperoj.

Dalibor Chalupa (1900-1983) estis instruisto, kiu post kelkaj jaroj da instruado transiris al radio-stacio de Brno kaj kiel dramaturgo preparis multajn teatraĵojn por radiofonia elsendo, kiu necesigas iomete adapti la verkojn, ĉar la aŭskultantoj ne vidas la aktorojn. Kiel dramaturgo li laboris ankaŭ por Verda Stacio, eĉ kiam li transiris al Prago. En Brno li kunfondis literaturan grupon kun Jiří Wolker, Lev Blatný kaj aliaj, kaj eldonadis monata revuon *Host* (Gasto). Ankaŭ li mem verkis poezion kaj postlasis kvar poemkolektojn *Brázda v duši* (Plugosulko en la animo), *Duhové poledníky* (Ĉielarkaj meridianoj), *Promlčené výzvy* (Proskriptitaj alvokoj), *Šťastný nový rok* (Feliĉan Novjaron). Sub lia reĝisorado okazis la unua longa elsendado de Verda Stacio la 1-an de majo 1933, kiu konsistis el 10 partoj (Voskovec kaj Werich, Vlasta Burian, Josef Suk, du poemoj de S. Schulhof k.a.). Tiajn radiofilmojn li preparis ankoraŭ multajn, same kiel radioludojn kaj prelegojn. Radioludo „Ĉu vero aŭ fakto“ parolis pri internacia lingvo.

Milda Jakubcová (1899-1979) estis latvino, fraŭline Pirsts, kiu edziniĝis al František Jakubec (1894-1968) en Brno, kunlaboris kun A. Balaš en la Esperanto-rondeto ĉe la 1-a Maŝinfabrika de Brno, kontribuis al diversaj gazetoj ne nur per artikoloj, sed ankaŭ per originalaj poemoj. Ŝia poemkolekto *Estrado de animaloj* (bestoj rakontas siajn spertojn pri homoj) estis stencilite eldonita fare de la menciita rondeto. Ŝi estis sekretario de Latva Esperanto-Asocio, kunlaborantino de „Ondo de Daugava“, kunredaktis la poemarn de J. Rainis kaj la volumon de tradukoj el la latva lingvo „Latva poezio“. Veninte al Ĉeĥoslovakio ŝi kontribuis al „Esperantisto Slovaka“, „Juna voĉo“, „Amikeco“ latva kaj estona k.a. En Slovakio oni nomis ŝin honora estraranino de Slovaka Esperanto-Societo.

Jan Kajš (1875-1955), kluba prezidanto 1904 kaj 1906, estis kompostisto, tipografo, eldonisto, librovendisto, propagandisto de planlingvoj. Lia firmao sidis en Židenice. Li apartenas al la fondintoj de nia klubo, entuziasma propagandisto kaj instruanto de la lingvo, dufoje elektita kiel kluba prezidanto. Sed post Ido-krizo li aliĝis al Ido kaj fariĝis kontraŭulo de Esperanto, poste ankaŭ Idon li forlasis kaj fariĝis propagandisto de Okcidentalo, eldonadis pri-okcidentalajn gazetojn *Jazyk mezinárodní* (Lingvo internacia) kaj *Učitel světomluvy* (Instruisto de mondlingvo). Li publikigis dekon da broŝuroj pri Ido kaj saman kvanton pri Okcidentalo. Dum siaj publikaj prelegoj li ofte havis akrajn polemikojn kun esperantistoj (ambaŭ sin reciproke kulpigis pri fanatika maltoleremo).

Růžena Kaplerová (1890-1971) honora membrino de la klubo, ŝi estis kluba bibliotekistino. Ĉeĥoslovaka radio intervjuis ŝin kaj ankaŭ s-inon Julie Šupichová, kiun ŝi invitis por la intervjuo, do dank' al ŝi ni havas voĉon ankaŭ de nia plej grava esperantistino.

Theodor Kilian (1894-1978), kluba prezidanto 1936, estis mezlerneja profesoro, aktiva precipe en Třebíč, aŭtoro de famaj lernolibroj por kursoj, aŭtodidaktoj kaj por tendaro en Lančov. Inter la militoj li partoprenis prelegojn de Verda Stacio kaj tiam li fariĝis kluba prezidanto en Brno. Nelonge antaŭ la dua mondmilito li esperantigis kontraŭfaŝisman dramon de Karel Čapek *Blanka malsano*. Post la milito li aktivis en Třebíč kaj partoprenis en la someraj tendaroj, por kiuj li preparis lernolibron ABC, vortareton de 808 plej uzataj vortoj kaj legolibreton *La mondo rakontas*. Postmorte la klubo eldonis lian tradukon de poetisma eseo *Konstruado en alto* de Otakar Březina. Grava estas ankaŭ lia ĉeĥlingva broŝuro *Esperanto a jeho tvůrce* (Esperanto kaj ĝia kreinto, 1934). Theodor Kilian, honora membro de ĈEA, apartenas al niaj plej gravaj esperantistoj en la historio.

Domin Konečný, kluba prezidanto 1912, estis poŝta oficisto, en la unuaj jaroj de la movado li gvidis multajn kursojn kune kun Karl Steier, Josef Záboj kaj prof. Bohumil Hollman. Li laboris ankaŭ kiel kluba sekretario.

Jiří Kořínek (1906-1988) estis komerca komizo en Liberec, ekde 1931 en Brno ĝis 1964, kiam li transloĝiĝis al Ústí nad Labem. Li apartenis al plej bonaj tradukantoj de poezio al Esperanto, precipe de muzikaj tekstoj. Li ricevis ne nur honoran membrecon de ĈEA, sed ankaŭ la ĉeĥa ŝtato aljuĝis al li titolon „meritplena laboranto en kulturo“. Li esperantigis kelkcent poemojn de ĉeĥaj aŭtoroj, kiuj aperadis en esperantlingva gazetaro tra la tuta mondo, ariojn de multaj ne nur ĉeĥaj komponistoj kaj ankaŭ kompletajn librojn: *Panjo* de J. Seifert, *Manon Lescaut* de V. Nezval, *Flugilhava ŝtono* kaj *Serĉado de blua tono* de Jiří Karen, *Sur la sojlo de la amo* de M. Procházková, *Sileziaj kantoj* de P. Bezruč kune kun R. Hromada kaj T. Pumpr.

Rudolf Krchňák (1905-1996) estis nevidanta esperantisto, muzikisto, instruanto de pianludo, pianagosdisto kaj komponisto de kameraĵoj, vokalaj kaj instrumentaj koncertaĵoj. Li iniciatis proklamon de la 13-a de novembro kiel Tagon de Nevidantoj, ĉar la 13-an de novembro 1745 naskiĝis Valentin Hay, kiu kiel la unua en la mondo komencis eduki kaj laborigi nevidantojn. Antaŭ la dua mondmilito li eldonadis gazeton *Nevidomí hudebník* (Nevidanta muzikisto) kaj post la milito verkis tri librojn: *Péče o nevidomé na Moravě* (Zorgo pri nevidantoj en Moravio, 1946), *S bílou holí* (Kun blanka bastono, 1948) kaj *Nevidomí známí, neznámí* (Nevidantoj konataj, nekonataj, 1992).

Inĝ. Vincenc Kroužil (1876-1954), kluba prezidanto 1921, estis mezlerneja profesoro, honora membro de la klubo. Li plurfoje prelegis pri Esperanto kaj gvidis kursojn en Industria lernejo, Komerca Akademio, Societo de inĝenieroj kaj arkitektoj. Li esperantigis broŝuron de Arne Novák *Ĉeĥa literaturo laŭ birdperspektivo* (1921), enĉeĥigis eseon de T. J. Gueritte *Esperanto: mezinárodní jazyk inženýrů* (Esperanto: internacia lingvo de inĝenieroj) kaj el la

slovaka *Celozemský univerzálný štát* (Tuttera universala ŝtato, 1927) Jána Maliarika. Li enĉeĥigis ankaŭ verkojn de germana ezotera verkisto Jakob Lorber (1800-1864), nome *Říše Boží, Velké evangelium Janovo, Země přirozená a duchovní* (Regno Dia, Granda evangelio de Johano, Tero natura kaj spirita). Post la dua mondmilito li ankoraŭ prelegis en la klubo (Ĉapitroj el kristana teozofio, Ĉapitroj el la Malnova Testamento).

Marta Lorková (1924-2005) estis bankoficistino kaj tial ŝi akceptis funkcion de kluba kasistino. Sed ŝia hobbio estis deklamado de poezio. En la postmilitaj jaroj ŝi aktoris en la kluba junulara teatra grupo, poste ŝi preparadis poeziajn vesperojn, ĉefe okaze de Sankta Nikolao. Ofte ŝi preparis prelegojn pri kulturaj aŭ religiaj temoj. Ni surbendigis ŝian programon pri Jaroslav Vrchlický.

Rudolf Nečas (1900-1971) honora membro de la klubo, membro de la loka kongresa komitato ĉe la tutŝtata kongreso en Brno (1950), al la klubaj programoj li kontribuis per prelegoj pri virinoj rigardataj de viroj, internacia korespondado, teatraj, bonhumoraj kaj kantaj prezentadoj, Sokol-idealaj, arbora vivo laŭ J. Vrba.

Karel Pelant (1874-1925), kluba prezidanto 1901, estis ĉeĥa ĵurnalisto, liberpensulo kaj tradukanto (tradukis en la ĉeĥan el Voltaire kaj Jerome Klapka Jerome). En siaj artikoloj li okupiĝis ekz. pri klerikalismo, kremacio, estonteco de la nacio, Platono, Karel Havlíček, pri li mem verkis Jaroslav Hašek kaj Josef Svatopluk Machar. Li aŭtoris broŝuron *Idea řeči mezinárodní* (Ideo de la lingvo internacia, 1902), en 1901 li fondis „Unuan societon de aŭstraj esperantistoj en Brno“, poste li transloĝiĝis al Prago kaj fondis tie „Esperantistan klubon en Praha“ (1902). En 1925 lin surveturis aŭtomobilo, kiam li estis transiranta straton legante ĵurnalon.

Ota Petr (1893-1971) honora membro de la klubo, posedanto de presejo, kunaŭtoro de vortaro (Slovník esperantsko český, R. Hromada - O. Petr, 1930), li meritis, ke en gazeto *Nový lid* (Nova Popolo, 250 000 eldonkvanto) aperadis en 1927 konstanta Esperanto-kurso kun rubriko gvidata de J. Vondroušek.

František Racek, kluba prezidanto 1905 - fotografisto, post disfalo de la societo je bohema kaj germana partoj en 1905 li iĝis por unu jaro prezidanto de Klubo de Bohemaj Esperantistoj en Brno. Aliaj informoj ne estas konataj. Eble li estas identa kun fotografisto František Racek en Královo Pole (mortinta en 1932), pri kiu informas Enciklopedio de Brno.

Alena Růžičková-Pavlinová (1910-2003) estis aktorino de la teatro „Fratoj Mrštík“ en Brno, profesorino de JAMU, honora membrino de ĈEA. Ŝi ofte kontribuis al la kluba programo per deklamado, ŝia voĉo estis magnetofone registrita kun esperantlingvaj prezentoj el Emilia Marty, Morto de Arĥimedo kaj Ĉeĥa balado. Antaŭ ol ŝi venis al Brno en 1949 ŝi aktoris en Moravia-Silezia teatro en Opava, en Honzl-studio, Akropolis, Urania en Prago, Sudbohemia teatro en České Budějovice kaj Beskida teatro en Hranice. Ŝiaj plej gravaj roloj Vojnarka (Jirásek), Kostelnička (Preissová), Patrino (Čapek), sinjorino Dulska (Zapolska), sinjorino Warren (Shaw), Stranga sinjorino Savage (Patrick), Avino (Cason - Arboj mortas starante), Panjo (Williams), Ludmila (Tyl), Aurelia (Giradoux), Gizela (Örkeny). Ni memoras ŝin en teatraĵo de Klicpera „Mensogulo kaj lia familio“, prezentata okaze de ŝia vivjubileo. En la paŭzo ŝi dankis gratulantojn kaj parolis de sur la scenejo pri Esperanto.

Vilibald Scheiber (1904-1974) estis muzikisto, harpoludanto, dum certa tempo li estis ĉefo de operejo de Silezia Nacia Teatro en Opava, poste repetitoro de JAMU. Por nia klubo li preparadis koncertajn programojn kaj kunlabore kun Jiří Kořínek li adaptis multajn muzikajn

tekstojn, precipe oper-ariojn, por prezentado en la klubejo. Konservigis kelkdek liaj adaptaj en nia kluba arkivo. Li estis honora membro de ĈEA.

Inĝ. Jaroslav Sítko, kluba prezidanto 1919 kaj 1924 - fervoja inspektoro, loĝanta ĉe *Rosické nádraží* en Brno, en 1907 li apartenis al fondintoj de Bohema Unio Esperantista kaj prizorgis ĝian informadon (kun Gustav Ctibor el Praha kaj František Svačina el České Budějovice). En la revuo *Tra la Mondo* 12/1908, p. 177, aperis lia traduko de artikolo *Arĥeologio* de Luboš Jeřábek. Pliajn informjn ni ne havas.

Augustin Skaunic, kluba prezidanto 1903 - eble identa kun laborista verkisto, mortinta 26.1.1920 en Brno, verkinta librojn *Obrázky z našeho lidu* (Bildoj el nia popolo, 1894), *Malí velikáni: povídka pro děti, kterou mohou i velcí čísti* (Etaj granduloj: rakonto por infanoj, kiun ankaŭ plenkreskuloj povas legi, 1907), *Vojtěch Staněk a jeho rodina* (Vojtěch Staněk kaj lia familio, 1912) kaj *Síla slabého: románek z dělnického života* (Forto de malfortulo: romaneto el laborista vivo, 1920). Enciklopedio de Brno mencias August Skaunic (nask. 7.7.1864), edzo de sociala laboristino kaj verkistino Františka Skaunicová. Ni ne scias, ĉu temas pri nia prezidanto aŭ pri alia samnoma persono.

Inĝ. Antonín Slavík (1893-1942) estis komence arma radiotelegrafisto, poste direktoro de Radiojournal Brno, sekve ankaŭ de Verda Stacio. Per sia prelego li komencis t.n. „horetajn“, ofte li enkondukis diversajn esperantlingvajn programojn, estante mem esperantisto. Post okupacio li tuj aliĝis al la rezista movado, estis arestita kaj en Berlino ekzekutita. En Beethoven-strato n-ro 4 estas lia memortabulo kaj en kvartalo Černá Pole (Nigraj Kampoj) unu strato portas lian nomon.

Ernesto Sonnefeld (1905-1974) estis germana ĉefia esperantisto kaj esperantologo, akademiano, elstara figuro de Sud-Amerika Esperanto-movado. Li naskiĝis en Uherský Ostroh (germane Steinitz), studis ekonomikon en Vieno, kie li kiel 17-jarulo konatiĝis kun Esperanto. Akirinte ekzamenon de Esperanto-instruanto, li gvidis plurajn kursojn kaj kun sia instruisto Emil Pfeffer redaktis gazeton *Weltsprache*. En 1924 li redaktis kongresan bultenon de UK en Vieno. Tamen en 1927 li ekloĝis en Brno, ĉar kiel 21-jarulo li decidis akcepti ĉeĥoslovakon ŝtatanecon. Dum tri jaroj li redaktis kluban bultenon (dek numeroj konserviĝis). En 1938 li fuĝis antaŭ la milito al Sud-Ameriko, vivis en Buenos Aires kaj kublaboris kun lokaj esperantistoj. Post 1960 li transloĝiĝis al Montevideo kaj estis elektita prezidanto de la urugvaja asocio. En 1968 li fariĝis eĉ membro de Akademio de Esperanto. Li verkis plurajn artikolojn por gazetoj pri lingvaj temoj, esperantigis gaŭĉan eposon *Martín Fierro* de la argentina klasikulo José Hernández (1834-1866) kaj hispanlingvan verkon de Tibor Sekelj *Tra la lando de indianoj*.

Marie Strejčková-Šamlová (1891-1970) kaj ŝia filo **Jiří Vítězslav Šamla (1913-1994)** lernis Esperanton en 1927 kaj iĝis parolistoj de Verda Stacio. Jiří esperantigis por disaŭdigo unuafoje *Venditan Fianĉinon* (post la milito alian tradukon faris T. Pumpr), dramojn *Lunatiko* de Jiří Mahen, *Forlasita* de Eduard Bass, unuaktaĵojn de Averĉenko *Forta karaktero* kaj *Silentema najbaro* kaj la plej sukcesan verkon, opereton *Sur rozoj sternite* de la aŭtoroj B. Polách kaj Jiří Žalman (= František Kožík). Li ankaŭ tre detale priskribis la laboron de Verda Stacio en samnoma libro, kiu estas por ni ĉefa fonto de informoj pri esperantlingvaj elsendoj inter 1932-1938. Li ankaŭ aŭtoris du lernolibrojn de Esperanto kun vortaro kaj unuafoje esperantigis *Baladon pri okuloj de l' hejtisto* de Jiří Wolker. Kiel redaktoro de la radiostacio li preparis ankaŭ kelkajn ĉeĥlingvajn prelegojn (ekz. Gaja mikrofono, Magia trajno). Ĉion ĉi li faris ĝis sia 25-a jaro. Post la milito li dediĉis sin precipe al citrusoj kaj akiris grandan respekton inter citrusistoj. Antaŭ nelonge aperis ĉeĥlingva antologio de forgesitaj poetoj kaj inter ili Jiří Šamla.

Jaromír Šikula (1924-2000) estis universitata instruisto de botaniko, kiu ofte parolis en radio kaj televido pri botanikaj temoj. En nia klubo li prelegis pri Tagore, moderna kaj tradicia medicino, ĝardenistiko, kulto de floro, por Starto li verkis artikolojn kun similaj temoj. Liaj ĉefa verko estas universitataj lernolibroj por studentoj de Veterinara kaj Farmacia Universitato en Brno, nome Botanika veterinární (Botaniko veterinara), Rostlina a prostředí (Planto kaj medio), Veterinární botanika a pícninářství (Veterinara botaniko kaj furaĝistiko), Veterinární botanika a zemědělství (Veterinara botaniko kaj agrikulturo), Zelenina, rostliny kořeninové a léčivé (Legomoj, plantoj radikaj kaj kuracaj), 25 let brněnského zahrádkářství (25 jarojn de ĝardenistiko en Brno). Li kunaŭtoris ankaŭ libron *Zemědělská encyklopedie* (Agrikultura enciklopedio).

Miroslav Tůma (1920-1992) estis inĝeniero, kiu okupiĝis pri la varmo el vidpunkto de fizikisto. Lia libro *Pri la varmo* estis dufoje eldonita. Sed lin interesis ankaŭ lingvistikaj problemoj, kiel atestas titoloj de liaj du prelegoj en nia klubo (Verdaj konsideroj, Lingvo: ponto kaj abismo). Li devenis el Nový Jičín.

František Válka, kluba prezidanto 1933, estas aŭtoro de libro *Všude dobře, doma nejlépe* (Ĉie estas ĉarme, sed hejme plej varme, 1936), kies celo estis fortimigi homojn vojaĝi al Brazilo, kie logantoj promesis trovi paradizon. Ankaŭ li mem lasis sin konvinki, sed revenis tute sen iluzioj. En la libro li ne malkaŝas sian aĝon, tamen diras kelkajn detalojn pri sia familio. Li naskiĝis en Žarošice kiel la plej aĝa el sep infanoj. Ĉar agrikulturo ne povis ĉiujn vivteni, li foriris al Vieno kaj laboris en grandmagazeno. Lia edzino grave malsaniĝis kaj estis trafita de paralizo. La mono ne plu sufiĉis. Tiam li legis en „Internacia socia revuo“, ke esperantistoj volas en brazila Sao Paulo fondi kolonion, kiu promesas bonan profiton. Kun sia frato li forveturis, sed estis terurita de la brazilaj malhigienaj vivkondiĉoj, sentis sin trompita kaj revenis en Eŭropon. En la revuo Progreso 9/1922 aperis lia traduko de *Ekrevo de Don Juan* verkita de Josef Šimánek.

Josef Vondroušek (1904-1995), kluba prezidanto 1930 kaj 1945, estis bankoficisto, motoro de la kluba vivo kaj tradukanto el la ĉeĥa literaturo, honora prezidanto de la klubo, honora membro de ĈEA kaj UEA. Jam kiel kluba sekretario en siaj 28 jaroj li aktivigis klubanojn, zorgis, ke neniam manku klubaj prelegoj, invitis artistojn koncerti en la klubo, tralegadis esperantlingvan gazeton kaj per kluba bulteno informis klubanojn pri la plej gravaj eventoj en Esperantujo. Plej multe li tradukis el Karel Čapek (*Libro de apokrifoj, Poŝrakontoj, Milito kontraŭ Salamandroj, Naŭ fabeloj, Afero Makropulos, El vivo de insektoj, Anglaj folioj, Hordubal, Meteoro, Ordinara vivo*). Li amis bonhumoran literaturon (*Saturnin* de Z. Jirotko, *Ĝojoj de mia vivo* de J. Šmíd, *Edzinigebla knabino, Zorgoj de kronitaj kapoj, Marlupo kaj gaja vidvino* de M. Švandrlík, *Ondro kaj drako* de V. Dyk, *La aŭdienco* de V. Havel) kaj historiajn verkojn (*Propra biografio* de Karolo la Kvara, *Super valoj mateniĝas* de F. Kožík, *Ŝtono kaj doloro* de K. Schulz). Lia propra verko estas *Historio kaj biografioj* pri esperantlingva literaturo.

Historio de Brno en datoj

(Ekde la jaro 2001)

2001: Vilao Tugendhat registrita kiel heredaĵo de Unesko; malfermita oficejo de ĉeĥa ombudsmano; Moravia Landa Biblioteko en nova moderna domo; urba biblioteko Jiří Mahen rekonstruita

2002: nova biblioteko de filozofia fakultato ĉe la universitato Masaryk

2003: Teknika muzeo en nova konstruaĵo; dioceza biblioteko de episkopejo en Brno alirebla por la publiko

2004: reta Enciklopedio de Brno; integrita transporta sistemo

2005: foirejo Vaňkovka; pavilono de akuta medicino kaj bebokesto en hospitalo ĉe Mizerikordaj Fratoj

2006: rekonstruita placo de Libereco; rekonstruita pavilono Anthropos; palaco Omega; galerio de moderna arto Wannick Gallery

2007: nova Moravia Landa Arkivo; plurfunkcia centro por personoj kun difektoj de komunikado

2008: Muzeo de ĉeĥa kaj slovaka ekzilo; statuo de W. A. Mozart antaŭ rekonstruita teatro Reduta

2009: rekonstruita avenuo Husova; kapucena biblioteko malfermita por la publiko; Teatro de ŝansono

2010: universitata kampuso en Bohunice; akvoparko en Kohoutovice; tunelo en Královo Pole; kugloforma horloĝa mekanismo sur la placo de Libereco

2011: vilao Jurkovič rekonstruita; malfermo de Labirinto sub la Legoma placo; Telekomunika centro por surduloj